ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 9

SEPTEMBRO 2025 Kol. 481/41

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Septembro, 110-a UK, Rezolucio, La 111-a UK en Graz, Mesaĝo de UEA, Rememoro al UK, Inaŭguro de la memorŝtono, Invitas vin Choceň, Kongreso de ĈEA, Tago de lingvoj, Trista informo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Septembro

Finplugis mia frato kaj maljungis la ĉevalojn.
Kaj dum krepusko en ĉevalharojn de l´amiko sian kapon
silente ponis li, karesis lian kolon
kaj enaŭdiĝis en la voĉon de l´pejzaĝo.

El malproksime sonoriloj sonas en vesper´ kvieta
kaj preĝo de vilaĝoj ŝvebas en krepusko malvarmeta.
Spirito de la tero kantas: timo, kredo kaj doloro
fandiĝis en ĥoralo, kiu flugas
al la ĉiel´eterna.

Sankta Venceslao,
nin kaj la estontuloj
ne lasu vi perei.

Karel Toman – Monatoj
En Esperanton tradukis
Jaroslav Mráz



# La 110-a UNIVERSALA KONGRESO EN BRNO 26.7.-2.8.2025

Al la kongreso aliĝis pli ol mil kongresanoj el 63 landoj. Tamen kelkaj ne povis veni pro diversaj kialoj. La kongreso okazis en la dua plej granda urbo de Ĉeĥio - Brno, situanta en la sudoriento. Gastigis ĝin la Universitato de Mendel. La revuo Esperanto jam anticipe informis pri la urbo mem kaj pri Ĉeĥio ĝenerale.

Antaŭ la inaŭguro estis elektita nova estraro de UEA. La juna kaj talenta brazilano Fernando Maia fariĝis la nova prezidanto. La temo de la ĉi-jara kongreso estis "Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj".

En ĵurnaloj aperis pluraj artikoloj pri la evento, okazis elsendoj en radio kaj televido. Akurate aperis la bone redaktita kongresa kuriero "Drako de Brno". Eblis fotiĝi ne nur kun la Majstro. Ĉe la inaŭguro estis nomumitaj novaj honoraj membroj.

Kiel jam sciate, la programo de Universala kongreso estas tre abunda. Oni ĉiam devas elekti inter pluraj samtempaj programeroj tion, kio plej interesas. Tre riĉaj estis kulturaj programeroj kaj vesperaj prezentaĵoj.

Sukcesa estis la "Ĉinia tago", kiu okazas ĉiujare dum la UK. La fotoekspozicion "Bela Esperanto, bela Ĉinio" admiris multaj samideanoj. Atenton kaptis ankaŭ la ekspozicio pri filatelo instalita ĉe la enirejo de la kongresejo. Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare okazis futbalmatĉo kontraŭ lokuloj, en kiu venkis nia teamo.

Dum la kongreso ĉeĥoj multe kontribuis al la programo per diversaj prelegoj. Ne mankis gustumado de ĉeĥaj bieroj kaj vizito de bierfabriko. Interesiĝantoj povis lerni la ĉeĥan lingvon, kiu estas tre komplika por eksterlandanoj, ekscii pri la ĉeĥa

edukado, pri la ĉeĥa pedagogo kaj humanisto Komenio, kiu jam de la 17a jarcento proponis la ideon de la internacia lingvo por bona komunikado, pri la historio de la E-muzeo en Svitavy, pri la trampa movado en Ĉeĥio, pri la naturo de Brno kaj pri ties ĉirkaŭaĵo.




Bele prezentita estis la historio kaj la naturo de Ĉeĥio. Oni povis gustumi ne nur ĉeĥajn manĝaĵojn, sed ankaŭ la kulturon kaj folkloron, belajn pejzaĝojn dum multaj ekskursoj. Alloga estis vizito al la botanika ĝardeno, kaj fervojistoj kontribuis per informo pri planado konstrui novan, modernan stacidomon en Brno.

Okazis E-kursoj sub la gvido de spertaj esperantistoj kaj KER-ekzamenoj. Interesis ankaŭ la scienca programo, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de novaj teknologioj, artefarita intelekto, demenco kaj dulingvismo, estonteco de Esperanto, aŭtoraj duonhoroj kaj aliaj programeroj (ne eblas listigi ĉiujn). En la programo ne mankis belartaj konkursoj, UEA respondas, Amo seminario, IKU-prelegoj, Scienca Kafejo kaj la ŝatata aŭkcio. Agrable estis ripozi en la ĉirkaŭo de la universitato, eĉ sub arbo.

Al la vesperaj programeroj kontribuis ankaŭ ĉeĥaj artistoj per koncerto de operkantisto Richard Haan, Jolana Smyčková kaj iliaj du knaboj kun la orkestro de la teatro Semafor. Muzikgrupo

"Šafrda Memory Band" furoris en vespero per konataj kantoj. La Teatro "Verda Banano" prezentis kabaredon "Kongresa Kafejo". La gejunula teatro "DOMA" el Svitavy prezentis teatraĵon "Lampiroj".

Inter esperantistaj artistoj koncertis Ĵele, Amira, Kaŝi, Tim Gallego, Martin kaj Bertilo, La Perdita Generacio, Duo Bemolo.




Kajto kiel ĉiam ĝojigis kaj dancigis la publikon. Ĉi-foje Kim animis la kongresan balon.

Diversa estis la oferto de duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj. Esperantistoj povis kun spertaj ĉiĉeronoj admiri plurajn kastelojn, belajn ĝardenojn, burgojn, grotojn, akvorezevujojn, bierfabrikon, muzeon de Romaa kulturo, aŭ vilaon Tugendhat. Aparta interesiĝo ekestis pri la E-muzeo en Svitavy kaj pri la vespera stelobservejo en Brno kun klarigoj pri la somera ĉielo de nia fama astrofizikisto Amri Wandel.

Ĉifoje la nomŝildoj estis presitaj ambaŭflanke, kio estus imitinda en sekvaj kongresoj. Alia pozitiva oferto estis senpaga uzo de trafikrimedoj (krom taksioj). Bedaŭrinde mankis surpaperaj informoj pri Esperanto por scivolemaj preterpasantoj. En Francio oni solvas tion per disdono de etaj kalendaretoj kun koncizaj informoj pri E-gramatiko kun adreso por pli da informoj. Kelkaj salonoj por prelegantoj malgrandis.

Dum la internacia adiaŭa vespero prezentiĝis diversaj talentuloj el niaj vicoj. Ni povis spekti dancojn, kantojn, skeĉojn, muzikadon kaj ĥoruson sub gvido de Zdravka Bojĉeva.

Aparte notinda estas surekrana prezento de la raporto pri la kongresa semajno. Tiu resumo estas granda avantaĝo por




rememoro pri la kongresaj aktivadoj. Ĉiuj esperantistoj certe travivis neforgeseblajn momentojn kaj renkontiĝojn kun malnovaj amikoj kaj novuloj.
Ĉeĥaj esperantistoj vere strebis organizi neforgeseblan kongreson kaj prezenti kiel eble plej bone la ĉeĥan landon. Ĉe la fino ili estis regalitaj per ladskatolaj bieroj kun simbolo de la kongreso.

La venontjara UK okazos en Aŭstrio en la urbo Graz, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto. Partoprenu ĝin! Liba Gabalda

## Rezolucio de la 110-A UK de Esperanto en Brno.

Inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 2025 kunvenis 1132 homoj el 63 landoj en Brno, Ĉeĥio, por partopreni en la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Ni diskutis la temon *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj*. Samtempe ni ilustris per nia propra agado, kiel bone la internacia lingvo Esperanto servas kiel ponto inter malsamlingvanoj el diversaj landoj kun diversaj spertoj kaj opinioj. Limiginte la traktadon de novaj teknologioj al ties komunikaj aspektoj, ni verkis raporton kaj surbaze de ĝi tiun ĉi rezolucion: Kun ĝojo ni konstatas, ke la novaj komunikaj teknologioj ebligis signifan kreskon de la nombro de praktike atingeblaj Esperanto-parolantoj, pro kio la kono de Esperanto en konektita mondo fariĝas ĉiam pli valora por atingo de paco kaj konfido inter la popoloj; Ni notas, ke artefarita intelekto (AI) por maŝina tradukado kaj, helpe de tio, multlingva komunikado fariĝis malmultekostaj kaj vaste uzeblaj. Samtempe ni notas, ke la instigoj lerni fremdajn lingvojn malfortiĝas i.a. pro la uzo de AI kaj reduktiĝas lingva egaleco, kondukante al kultura provincismo. Kun zorgo ni konstatas, ke estiĝas abundego da ciferecaj komunikiloj, per kiuj multaj homoj emas aliĝi al fontoj de informado kun samopiniaj grupoj, fortigante polusigon en la socio.

Ni atentigas, ke Esperanto plene taŭgas kiel internacia lingvo kaj jam posedas tutmondan komunumon de parolantoj, kiu kiel movado subtenas respekton kaj valorigon de fremdaj lingvoj kaj

kultura diverseco. Pro tio ni alvokas registarojn kaj la civilan socion en ĉiuj landoj: reveni al instruado ankaŭ de najbaraj lingvoj kaj enkonduki Esperanton kiel lernejan fakon por fortigi la senperan kontakton al najbaraj kulturoj kaj la neŭtralan alproksimiĝon al aliaj lingvoj; kaj labori por plifortigi la statuson de lokaj lingvoj kaj Esperanto kompare kun tiu de hegemoniaj lingvoj.

Ni konkludas, ke reciproka konfido povas kontribui al harmonia, respektoplena, sekura kaj interkultura socia etoso kaj redukti la disdividajn fortojn en la socio; respekto por lokaj kulturoj portataj de lokaj lingvoj tiel plifirmiĝas, kaj samtempe socia kohero por paco fortiĝas; tiel la novaj komunikrimedoj helpos konstrui pontojn inter la popoloj, kaj la tendenco al bariloj kaj polusiĝo malfortiĝos.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA, Brno, 2025-08-01

## La 111-a UK okazos en 2026 en Graz, Aŭstrio

Por la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) la Estraro de UEA elektis Aŭstrion (https://eo.wikipedia.org/wiki/Aŭstrio) kiel kongreslandon. La bela Graz (Graco) estos la kongresurbo.
(https://eo.wikipedia.org/wiki/Graz
Graz estas la ĉefurbo de la provinco Stirio. Ĝia nomo devenas de la slovena vorto Gradec, kiu signifas “kasteleto”. Ĝi estas la dua plej granda urbo en Aŭstrio (post Vieno) kaj havas kvar universitatojn kun ĉirkaŭ 40 mil studentoj. Kun pli ol 900 jaroj de ekzisto, en 2003 Graz estis la Eŭropa Kultura Ĉefurbo. Ĝi estas listigita kiel Monda Heredaĵo de Unesko kaj Urbo de Dezajno. Pro siaj turismaj vizitindaĵoj kaj oferto de gastronomia

diverseco ĝi ankaŭ estas konata kiel la Ĉefurbo de Ĝojo. Graciplena urbo.

Jam frue estis komerca lernejo en Graz, kie oni instruis Esperanton. De tiam gastiĝis en la urbo pluraj Eo-eventoj, inter ili la Aŭstria Esperanto-Kongreso de 1913, 1926, 1949 (okaze de kiu la Aŭstria Poŝto eldonis poŝtmarkon kun verda stelo kaj la vorto 'Esperanto') kaj 2024. Ankaŭ la Internacia Junulara Kongreso de 1970 kaj la Jubilea Esperanto-Konferenco de 1987 (dum kiu Ivo Lapenna proklamis la malfondon de Neŭtrala Esperanto-Movado). Intertempe la Esperanto-klubo de Graz aktivas. En 2023 aperis oficiala 42-paĝa gvidilo de la urbo en Esperanto. Tiu gvidilo estas internacie senpage mendebla ĉe la Turisma Oficejo de la regiono Graz, pri kio raportis UEA.facila (https://uea.facila.org/loke/graz-r75). Graz havas placon nomitan *Esperantoplatz*.

El la EKO 2025

## MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE ESPERO

En januaro 2025 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris la 12-an de julio Internacia Tago de Espero. Universala Esperanto-Asocio entuziasme esprimas sian subtenon de tiu iniciato. Kiel implicas ĝia nomo, la Internacia Lingvo Esperanto naskiĝis kaj plue vivas en etoso de espero – la kredo de juna kuracisto, Ludoviko Zamenhof, ke ekzistas alia vojo ol eterna militado, ke eblas kunvivi en paco. Zamenhof kreis internacian lingvon, kiu celis nutri esperon en ĉiuj popoloj pri alia vojo ol militoj, persekutoj, pogromoj kaj persista malamo.  Milionoj da homoj lernis Esperanton: hodiaŭ Esperanto estas konata kaj uzata de individuoj tra la tuta mondo. Tiuj homoj nutras esperon pri mondo, kie interhoma komunikado reduktu kaj fine estingu

la malfidon kaj batalemon kultivitajn de tro multaj homoj hodiaŭ. La Ĝenerala Asembleo, per sia decido, bonvenigis "agadojn kiuj celas regule mobilizi la klopodojn de la internacia komunumo por antaŭenigi bonfarton, cele al disvastigo de espero kaj plialtigo de paco, tolero kaj socia stabilo, respekto de diverseco kaj reciproka respekto." Universala Esperanto-Asocio, kaj la Esperanto-komunumo kiel tuto, bonvenigas tiujn iniciatojn kaj faros sian eblon, kunlabore kun la cetero de la civilaza socio, ne nur festi la Tagon de Espero, sed teni la flamon de Espero vivanta kaj brilanta tra la tuta jaro kaj en estontajn jarojn. El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

## Rememoro al la 110-a UK

La kongreson partoprenis pli ol 1000 kongresanoj de 63 landoj. La programo estis riĉa kaj organizaĵo ekscelenca. Lingvaj kursoj kaj ekzamenoj, artaj aranĝoj, sporta programo, ekskursoj en Brno kaj ankaŭ en aliajn urbojn - Lednice, Valtice, Kroměříž, Olomouc aŭ Moravia karsto... Kaj ankaŭ prelegoj pri Ĉeĥio.




Tre interesa estis prelego de s-o Mišurec Ĉeĥa biero. Ĉar biero okupas gravan postenon ne nur en la ĉeĥa historio kaj kulturo. Dum centoj da jaroj la produktado evoluis, sed la bazo de kvalitaj lokaj produktoj, dank' al Ĉeĥa biero povas ĝui popularecon, ne ŝanĝiĝas.

Biero estas fermentita alkohola trinkaĵo, unu de la plej

malnovaj alkoholaj trinkaĵoj en la mondo, la tria preferata trinkaĵo post akvo kaj teo. Biero estas produktata per kuirado kaj fermentado de greno, plejofte de hordeo. Biero kun lupolo devenas el germana-franca areo el la 9a jarcento. Ĝi estis perfektigita en la ĉeĥa lando en la 13a jarcento. La plej bona lupolo por bierproduktado troviĝas en la ĉirkaŭaĵo de la urbo Žatec.

Ni aŭdis prelegon pri la historio, koncepto kaj procezo de produktado de la ĉeĥa biero inkluzive statistikajn informojn koncerne la hodiaŭan staton:

- plej granda konsumo de biero en la mondo - j. 2023 (128 l/pers)
- en Ĉeĥio estas 508 bierfarejoj (en Prago ĉ. 50, en Brno 15)
- la plej granda bier-rilata Esperanta aranĝo “BIERO“
- la koncepto de la ĉeĥa biero iĝis la plej konsumata tipo de biero en la mondo (ĝis 90% de la tutmonda produkto)

Parto de la prelego estis ankaŭ gustumado, ne nur de la biero, sed ankaŭ ingrediencoj kaj mezproduktoj. Tio estis tre interesa. Poste ni povis aĉeti bieron en la akceptejo - en ladskatolo kun la tipo de la kongreso.

S. Nováková

## Inaŭguro de memorŝtono en Pardubice

Post la tre sukcesa 110-a Universala Kongreso en Brno, membroj de la Esperantista Klubo de Dr. Schulhof de Pardubice, kunlabore kun la Regiona biblioteko, inaŭguris memorŝtonon por memorigi la fondon de la klubo en la jar memorŝtonon por memorigi la fondon de la klubo en la jaro 1909.




Partoprenis ĉirkaŭ 35 E-subtenantoj el Pardubice kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj ankaŭ el Prago, Hořice kaj aliaj.
Poste ni vizitis la urban Bibliotekon kaj rememoris Lenka Angelová, nian eks-prezidantinon, kiu siatempe ĉi tie laboris.

La redakcio

**Ni invitas vin al renkontiĝo en la ĉeĥa urbo Choceň**

**okaze de la tago kun fervojo miniatura - 6.9.2025 de 10h**



Ni planas viziti la ekspozicion de fervojo miniatura, kiun en la loka kastelo preparis niaj kolegoj el FISAIC. En la stacidomo estos malfermita ankaŭ Muzeo de TT fervojmodeloj. Ni ne forgesos viziti restoracion, por interesiĝantoj estos mallonga, sed ne facila promenado tra Peliny. En nia klubejo okazos diskuto "UK Brno per miaj okuloj". Ne estas necese aliĝi, la aranĝo estas malfermita al ĉiuj interesiĝantoj.

Láďa Hakl

**Alproksimiĝas la kongreso de ĈEA 2025** en Havířov (17.-19.10.2025).

Samtempe mi invitas vin kaj viajn klubanojn partopreni la kongreson, kiu krom balotoj por nova komitato de ĈEA havos buntan, interesan programon.
La 26-a de septembro estas **Tago de lingvoj**. Se vi havas eblecon, bonvolu prezenti Esperanton.
Mi salutas vin kaj antaŭĝojas pri la renkontiĝo kun vi.

Leonarda Chaloupková, anino de la komitato de ĈEA

**Trista informo**:

Nia samideanino Jindřiška Dubinová, iama kolegino de la fondinto de AEH, mortis la 21-an de junio 2025, antaŭ ol atingi la aĝon de 75 jaroj.

Honoron al ŝia memoro.

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše příjmení jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.